

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Medvednica – nia ĉi-jara Esperantio

Verŝajne estas hazarde, sed mia unua Esperanto-korespondantino estas el tiu belega lando, Kroatio, eĉ el Zagrebo. Mi estis apenaŭ 16-jara adoleskanto, komencinta lerni Esperanton, kaj ĵus atinginta sesan lecionon, mi komencis korespondi kun Verica Zakula. Tre bela knabino, kiel aktorino, kiel vera modelo...

Nia iama sufiĉe stranga kolego Ivan Ŝir ankaŭ estis el Zagrebo, sed li estis tute blinda homo, kies vidantaj edzinoj ĉiam estis instruistinoj. Dum kelkaj jaroj li venadis en Plovdiv, laboradis en nia blindulentreveno, vendadis belan tolaĵon.

Preskaŭ 30 jarojn la Bulgaroj lernas Esperanton laŭ la Zagreba Metodo. En nian landon ĝin alportis kaj disvastigis Mariana Evlogieva.

Mia artikolo pri la psikaj baroj ĉe komuniĝo inter la viduloj kaj blinduloj estis publikigita en la kroata revuo "Riječ slijepih" (1987). Bedaŭrinde mi ne memoras la nomon de la tradukinto. La ĉi-jara Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj denove portis min al Kroatio

Ni loĝis, manĝis kaj kongresis en la bonega hotelo "Tomislavov dom" (Hejmo de Tomislav). Ĝi troviĝas sur la monto Medvednica (Ursa monto), sur la montopinto Sljeme – ĉ. 1000 metroj super marnivelo, la plej alta pinto de ĉi-tiu monto). La auta vojaĝdistanco ĝis Zagrebo estas ĉ. 30 minutojn. La nunan formon de fluganta hirundo la hotelo ŝuldas al la konata kroata arkitekto Stjepan Planić. La lasta kompleta renovigo de la hotelo estis en 2003.

La temo de la 84a LIBE-kongreso "Kion, kiel kaj kiom ni legas?" estis ege fruktodona kaj donas eblecon al ĉiu kongresano rakonti pri sia propra sperto. Krom la nevidantaj aŭtoroj talentaj prelegantoj estis ankaŭ elstaraj brilaj kroataj esperantistoj kun normala vidpovo kiel Zlatko Tišljar, Josip Pleadin, Neven Kovačić. Interesajn prelegojn prezentis niaj samsortanoj Nedeljka Ložaić, Galina Lukianenko, Antun Kovač, Anatolo Masenko, Tanabe Kunio, Gilberto Buchmann k.a.

La gekongresanoj estis el 16 ŝtatoj, situataj sur 3 kontinentoj. La nombro de la partoprenantoj estis sufiĉa modesta, nur 39 gesamideanoj, sed iuj el ili prezentis ekzotikajn landojn - Brazilo, Kubo, Svislando, Japanio. La plej grandaj delegacioj estis el Kroatio (7 personoj), Rusio (6 p.) kaj Aŭstrio (5 p.). Ŝajne la plej grava specifo de ĉi-kongreso estis la abundo da senakompanantaj samideanoj el diversaj mondpartoj. La alia aparteco, eble estis la multeco da ekskursoj: ĝis Zagrebo, ĝis la naskiĝvilaĝo de Josip Broz Tito, ĝis la Porblindula biblioteko, ĝis la Tiflogia muzeo, tra Zagorje, ĝis la bieno de verkistino-esperantistino Spomenka Ŝtimec, kie ŝi mem nin regalis kun kafo kaj dolĉaĵoj. Dank' al neimageble talenta kaj ĉiam entuziasma ĉiĉerono Neven Kovačić, niaj turismaj travivaĵoj estis brilaj kaj neforgeseblaj.

La ĝenerala asembleo akceptis la protokolojn de 83-a kongreso de LIBE sen ŝanĝoj. Al ĝi LIBE-estraro proponis Anatolon Masenkon por honora prezidanto de LIBE. Kompreneble, ni, unuanime konfirmis ĉi-tiun proponon kaj jen LIBE akiris sian novan honoran prezidanton, kune kun lia samaĝulo kaj amiko Theodor Speckmann. Interalie, mi raportis tre koncize pri esperantista movado inter bulgara blindularo. Eĉ mi anoncis pri la en septembro okzonta Esperanto-festivalo.

Ankaŭ forte impresita mi estis de la tre interesaj Esperanto-lecionoj de Natalia Kasimova. Ŝiaj instrumentoj estas modernaj, ŝia anticipa sinpreparo estas sufiĉe serioza kaj ŝia alta instruado estas alte alloga. Preskaŭ ĉiam la tuta kongresanaro estis ŝia diligenta kaj fervora lernantaro.

En la lastaj 18 jaroj la kongreso de LIBE ree, por la tria fojo, okazis en Kroatio. Kaj denove ĉio estas perfekta kaj brila!!! Sendube, laŭdojn kaj dankojn meritas multaj homoj, partoprenintaj en la organizo de ĉi-tiu ekskluziva internacia forumo. Sed la plej gravaj herooj laŭ mi estas Antun Kovač, Dragan Štoković, kaj Neven Kovačić. Ja ili estis kongresanoj, kiuj alvenis frumatene, antaŭ la kvina, aliaj forveturis en la noktomezo!!!

Forlasante la gastamajn Medvednica kaj Tomislavov dom, mi profunde kaj sincere dankas al niaj afablaj kaj malavaraj gastigantoj pro ĉio, kion ili faris por ni dum ĉi-tiuj ok neforgeseblaj tagoj!

Angel Sotirov